Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
Januaro-Aprilo 2013, n-ro 01-04 (1291-1294)

# Sennaciulo


## Tem-dosiero:"Esperanto – taŭga ilo por sociaj luktantoj"




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ajkido kaj SAT-estonto

Ajkido estas sporta disciplino originanta el batalteknikoj militaj. La baza tekniko – laŭ mia kompreno fontanta el longaj interparoloj kun amiko mia pasiiĝinta pri tiu ĉi sporto – konsistas el utiligo de la forto mobilizita de la atakanto por lin neŭtraligi. Konkreta ekzemplo estu la sekva. Iu fortega altstatura atakanto sin ĵetas al mi, pugnon antaŭen por frapi mian vizaĝon. Anstataŭ provi mem pli rapide ol mia atakanto pugnofrapi lian vizaĝon, mi – starante firme, fleksive kaj centrite sur miaj kruroj – samtempe per unu mano flanken devojigas lian vizaĝon kaj per la alia kaptas lian manartikon. Mi en la sama movo kaj per la forto mobilizita de la agresanto ĝirigas mian korpon ĉirkaŭ ties akso kaj flanken malekvilibrigas la atakanton, ĝis lia falo grunden.



Mi ne provas nun kursi pri sporto, kiun mi neniam fizike praktikis, sed nur enkonduke klarigas la pensofluon ĉisube disvolvotan.

Tiun bazan ajkidan teknikon mi regule praktikas en homaj interrilatoj k.a. nefizikaj situacioj. Kiam iu aŭ io malamike sin ĵetas al mi, mi ne provas kontraŭstari, mi evoluigas la aferon por ke kampoj pli fruktodonaj malfermiĝu antaŭ mi – eĉ se ekziston de tiaj kampoj mi neniam antaŭe estus diveninta.

Konkreta ekzemplo de mia ajkideca praktiko estu la sekva. Mi venis al konstato, ke mia persona situacio (financa kaj psik-bezona) ne plu ebligos al mi esti ĉefredaktanto de nia revuo. Anstataŭ provi tutforte daŭrigi mian laboron nunan ĝis elĉerpiĝo, mi simple – eĉ se ne tute facile – akceptis la konstaton tia, kia ĝi staris antaŭ mi, kaj verkis leteron al PK, ĜK-aro kaj redaktantoj por sciigi ilin pri mia decido ne plu ĉefredakti post la venonta numero.

Kaj tiam novaj kampoj ekmalfermiĝis antaŭ mi. Mi ne ĉi tie detaligos mian privatan vivon, sed koncentriĝos pri tio, kio povus interesi vin, kiel membron de SAT kaj leganton de *Sennaciulo*.

Konsiderante, ke la decido aperigi nian revuon nur ĉiun duan monaton ne per si mem solvis la problemon pri laborŝarĝo, manko de materialo – ĉi tiu numero aperas ege prokrastite pro tiu ĉi lasta problemo – kaj aliaj, sed nur prokrastis la elmontriĝon de tiuj problemoj, mi lastatempe ekpensis, ke provi kontraŭbatali tiujn problemojn sen profunde ŝanĝi la strategion rezultigos nenion.

En mia eksiĝa letero al Plenum-Komitato, mi sekve proponis tutecan rekonsideron de la tuta komunikado de SAT kaj LEA-oj, por estigi ian klaran kaj koheran strategion, komunan al la tuta SAT-movado, por ke la komunikado interna estu pli flua kaj kunlaboriga, kaj por ke la ekstera ebligu pli ampleksan vidon al ĉio, kio realiĝas en nia movado. Tia strategio kovru la diversajn komunikilojn (retan, poŝtelefon-programaran, revuan kaj flugfolian) laŭ la diversaj celitaj publikoj – memoru ni, ke en multaj mondopartoj malfacilas uzi la interreton sed tre uziĝas poŝtelefonoj – kaj laŭ enhavo kaj utilo. La celo de mia propono estas entute simpla: ke la aktivaj nun disponeblaj fortoj estu kiel eble plej efike utiligataj laŭ kompetentoj por disvolvi la laboron de la tuta SAT-movado kaj varbi interesiĝemulojn al ĝi kaj ĝin siavice disvolvi.

Por realigo de tia plano, mi sugestas al PK krei apartan laborgrupon – sub komuna respondeco de PK kaj LEA-oj – kuniganta ĉiujn SAT-anojn kaj LEA-anojn dezirantajn disponigi siajn kompetentojn aŭ proponojn por la priskribita celo.

La ajkideco de mia propono staras en forlaso de la provo kontraŭbatali la nunajn malfacilaĵojn per reproduktado de skemoj ne plu funkciantaj, kaj en konstruo de novaj skemoj pli adaptitaj al niaj kapabloj – ni ja kapablas multon ankoraŭ ne elprovatan! – kaj bezonoj, por malfermi antaŭ ni novajn perspektivojn.

Problemo nesolvebla ne estas problemo; ĝi estas nur konsiderinda bazo, sur kiu eblas konstrui ion novan. Mi tutkore deziras al ni fruktoplenan estonton. ★

*Robin' BETO*

# Enhavo


Ajkido kaj SAT-estonto 2

**Tem-dosiero:"Esperanto – taŭga ilo por sociaj luktantoj" 4**

Unua postkongresa ekskurso 4

Toleda ekskurso 4

El Coronil 5

Ekzemplodonaj virinoj 7

COS kaj Esperanto 9

Helpu per tradukoj al la retejo "LabourStart" 11

Finmuntita filmo nun estas lastfoje kontrolata de diverslingvaj tradukintoj 13

**Naciecaj problemoj 17**

La judofoba origino de la cionismo 17

**Homaj Rajtoj 18**

Fundamenta Ideo 18

Internacia Konferenco pri Homaj Rajtoj kaj Paco en Filipinoj 19

Leĝo de malnobluloj en Rusio 19

**Pri la Homoj kaj Ties Viv-medio 20**

Trudita Elektroŝparado en Hokkajdo en Vintro - Antaŭpreparo al Refunkciigo de Atomcentralo 20

17-an de Aprilo: Tutmonda Tago por la Kamparanaj Luktoj 22

**Tra Esperantio 23**

Raŭmismo kaj novliberalismo 23

**El la SAT-administrejo 26**

Vortoj de la kasistino 26

Donacoj 26

Nekrologio 26


**Karaj legantoj,**

La redaktoskipo bedaŭras pri la malfruo de ĉi numero de Sennaciulo, sed pro manko de artikoloj, decidis akcepti, ke ĝi aperu kiel kvar-monata numero, havante nur 28 paĝojn.

S-ulo estas la tribuno de ĉiuj SAT-anoj. Ni esperas ricevi viajn artikolojn kiel eble plej baldaŭ. Specife, ni aperigos por la nun preparata Majo-junia numero **tem-dosieron pri "Homa nutrado"**, kaj proponoj pri temoj kun kunordiganto por venontaj dosieroj estos bonvenaj.

Dankon, ni deziras al vi bonan legadon

*La enpaĝiganto, Ŝtonĉjo*


**Praktikaj *informoj***

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr
Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Tereza Sabatier
Kasistino: Franjo Lévêque
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

**Sennaciulo**

Ĉefredaktanto: Robin' Beto
Enpaĝiganto: Pierre Soubourou "Ŝtonĉjo"
Ceteraj redaktantoj: Andreo Hoaro, Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale

**Kontribuojn sendu elektronike al:** sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paperpoŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: franjo.leveque@gmail.com

Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaro.org
Librajn eldonproponojn sendu al: pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.

Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567